

ISSN 0023-3692

KONTAKTO

numero 246 (2011:6)

Historio

Fajra bato de Vezuvio

Facila

Ekblogu Esperante nun!

La blaga blogo

Blogo pri heroo | kulpulo

USSR

20 jarojn poste

Nanne Kalma: "Muziko estas ĉiam interne de mi"



ESTU KUN TEJO EN 2012

KOTIZTABELO DE UEA POR 2012

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2012

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Belgio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Brazilio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Britio/pundo	8	21	52	33	20	104
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Finnlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Francio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Germanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Hungario/forinto	1750	4400	11000	7000	4200	22000
Irlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Islando/eŭro	10	25	61	37	22	122
Israelo/eŭro	7	18	46	28	17	92
Italio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Japanio/eno	1120	2800	7000	4200	2520	14000
Kanado/dolaro	13	34	84	50	30	168
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	18	44	110	66	40	220
Pollando/zloto	26	64	160	100	60	320
Portugallio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	88	220	550	350	210	1100
Svislando/franko	12	30	75	45	27	150
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFA A/eŭro	6	16	41	25	15	82
TARIFA B/eŭro	5	12	31	19	11	62

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFA A: Bahamoj, Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novaĵbulteno.

MJ(-T): Membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto sen plia pago).

MA(-T): Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun Kontakto.

SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo Kontakto, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

MJ(-T): MEMBRO KUN JARLIBRO KAJ LA REVUO ESPERANTO RETE (KAJ ĜIS INKL. 29 JAROJ MEMBRO EN TEJO KUN KONTAKTO SEN PLIA PAGO).

MA(-T): MEMBRO-ABONANTO KIEL MJ(-T) PLUS LA REVUO ESPERANTO.

Kto: ABONO AL LA REVUO KONTAKTO, SEN MEMBRECO EN UEA/TEJO.

PT: PATRONO DE TEJO: POR SUBTENI TEJO (NE INKLUZIVAS MEMBRECON); RICEVAS LA REVUON KONTAKTO KAJ ALIAJN ELDONAĴOJN DE TEJO.

tejo
MOJOSAS



www.tejo.org

Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 246 (2011:6), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: <http://kontakto.tejo.org>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10
436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ri-
beirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@
tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felicio

Korektado: Rob Moerbeek

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skon-
pres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev
(Rusio), Sergey Tyirin (Israelo), Alexandre Baudry
(Francio), Gabriel Osho-Davies (Niĝerio), Victor
Solé (Katalunio), Simmon K. Barney (Usono), Et-
suo Miyoshi (Japanio), Ivo Miesen (Nederlando),
Vasile Gavrilan (Moldavio). Facillingvaj artikoloj
estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ
la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia
retpaĝo.

Anoncarifto: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR,
1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30
EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por
E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekster-
movadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por
anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu
vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia
retejo.

Malfortvidantoj: Estas kelkaj voĉlegitaj artikoloj en
nia retejo. Pliajn oni povas peti de Vasile Gavrilan
<pangavrilan@gmail.com>. Kasedlegantoj sendu
po du kasedojn de 90 minutoj al Rob Moerbeek,
Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Ne-
derland. Kun la poŝta glumarko de "Cécogramme"
(viro kun blanka bastono).

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la
Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen reflektas
nur la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la
Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna
uzo de la informoj.

*La redakcio kaj la eldonanto ne
respondecas pri la opinioj de
unuopaj aŭtoroj.*

Redakcie

Saluton!

Jen finfine ni pretigis la lastan numeron de la jaro 2011. Tiel kompletiĝas nia unua jarkolekto en Kontakto kaj tiu ĉi atingas tre ĝojigas nin. Ekde nia komenco, fine de 2010 kaj dum 2011, ni klopodis laŭgrade kaj konstante plibonigi nian laboron. Ni grandparte sukcesis kaj tio ne povus okazi sen la kunlaborado de multaj personoj, al kiuj sube mi dankas.

Sen la nemalhavebla, diligenta kaj volontula provlegado kaj korektado de Rob Moerbeek, vi certe forĵetus ĉi tiun revuon, tiom multaj estus la lingvaj fuŝaĵoj. Mi devas danki al Romulo, kiu eltenas miajn frumatenaĵojn telefonalkvokojn ĉe la fino de ĝia bela grafikumado; Johano el Skonpres, kiu respondecas pri la ĉiam pli bona papero, sur kiu la revuo estas presata; Floreal Martorell, ĉiam preta kunlabori pri la premioj, kiujn ni disdonas al niaj kunlaborantoj. Mi ankaŭ dankas al la TEJO-estraro, al ĉiuj en la CO de UEA kaj fine al ĉiuj niaj fidelaj kunlaborantoj, kiuj kunkreas tiun ĉi mojosan revuon, kaj al ĉiuj, kiuj dum tiu unua jaro nin helpis, kuraĝigis kaj kritikis.

La enhavo de tiu ĉi numero estas digna je tiu ciklofermo. La ĉefartikoloj ankaŭ pritraktas la finon de reliefa periodo en la frua historio de la homaro – la fino de USSR. 20 jarojn poste, la mondon ne plu dividas du malsamaj ideologioj. Socialismo por plejmulto de la homaro apartenas al la pasinteco kaj la tre interesaj kontribuadoj pri la temo respegulas tion.

Mi, kiel multaj aliaj esperantistoj, estas granda admiranto de la frisa muzikgrupo Kajto. Praktike, ne eblas resti indiferenta al la belaj kaj kortuŝaj melodioj de la grupo. Kajto, kaj ĝiaj albumoj ravas la esperantistojn jam de pli ol 20 jaroj. Tial, estis granda plezuro intervjui la motoron de tiu lokomotivo, kiu verŝajne en sia kariero registris pli da albumoj ol mi havas da jaroj – Nanne Kalma.

Meze de la jaro, mi konstatis ke malmultaj el la kontribuadoj venis de virinoj, kaj mi demandis min kion fari por tion ŝanĝi. Feliĉe, antaŭ ol mi povis ion elpensi, du novaj junaj kunlaborantinoj aperis. Ĉi-eldone ni aperigas jam la duan kunlaboraĵon de ambaŭ – de Olga Ŝilajeva la tre interesan artikolon pri malkovro rilata al la vulkano Vezuvio kaj ĝia tragedia historio; de Ana Ribeiro la artikolon pri blogado en Esperanto. En la nuna numero vi trovos ankaŭ la rubrikojn "La blaga blogo", "Facila" kaj "Recenzo". La TEJO-movadajn raportojn prezentos la paĝoj de TEJO Tutmonde.

Tiu ĉi jaro prezentis al ni plurajn defiojn. La ĉiam kreskanta volo fari pli kaj krei ion novan samtempe kreskis la postulojn pri nia laboro. Ni ĝojas se vi decidus resti kun ni venontjare! Ek al 2012!

Rogener PAVINSKI

ENHAVO

Reagoj. Informe. Temo-sugestoj	4
Intervjuo Nanne Kalma - "Muziko estas ĉiam interne de mi"	5
La blaga blogo Blogo pri heroo kulpulo	9
Ĉefartikolo USSR - 20 jarojn poste	10
Ĉu Okcidenten, ĉu Orienten?	11
Multfoja reviviĝo laŭlonge de unu vivo	12
Freneza mondo de Kusturica: Ĉiu trovos lokon por si	16
Recenzo	17
Historio Fajra bato de Vezuvio	18
Facila Ekblogo Esperante nun!	20
TEJO tutmonde	21



Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontakto nin per la retadreso kontakto@tejo.org

En la artikolo "Memkritike pri la cifereca revolucio", Leonardo JANZ tute pravas, ke la plio de tio, kio estas interŝanĝata en la sociaj komunikiloj, estas tempoperdo. Tamen estas bone interŝanĝi salutojn, ĉar tio malfremdigas la konatojn. Granda tempoperdo estas la diroj, kiaj "bonan nokton", "dormu bone", "nun mi mangxas panrostaĵon", "nun mi vestiĝas" "havu belajn sonĝojn" kaj 126 pliaj komentoj.

Manuel CAMPAGNA - Kanado [per 'Facebook']

INFORME

Abono-kampanjo

TEJO kaj la revuo Kontakto eklanĉas abono- kaj membro-kampanjon, kiu disdonos premion por novaj membroj. Personoj, kiuj unuafoje aliĝos al TEJO aŭ aparte abonos Kontakton komence de 2012 ricevos TEJO aŭ Kontakto-T-ĉemizon. Ricevos ilin tiuj, kiuj aliĝos/abonos en januaro kaj februaro. Pliajn detalojn en nia retejo: kontakto.tejo.org



Universala Lingvo

La usona reĝisoro Sam Green ekis kampanjon por disvastigi sian dokumentan filmon "The Universal Language" (La Universala Lingvo). Kadre de ĝi, nova dulingva (angla, Esperanto) retejo por la filmo estis lanĉita. En <http://esperantodocumentary.com/> eblas mendi lumdiskon aŭ spekti la filmon enrete aŭ elŝuti ĝin kontraŭ 5 usonaj dolaroj. Intertempe la filmo ekhavis novan, pli belan kovrilon.



Premioj

Gajnis la 2^a Volumon de la Hiphopa Kompilo la kunlaborantoj Olga Ŝilajeva, Viktoro Solé kaj Gregorio Naĉu. Ili kunlaboris por la numero 2011:5 kaj estis lotumitaj inter ĉiuj kunlaborantoj por tiu eldono. La MP3-formajn albumojn disponigas la diskeldonejo Vinilkosmo [<http://www.vinilkosmo-mp3.com>].



Temo-sugestoj

Ĉu vi ŝatus verki por Kontakto, sed mankas inspiro?

Ni proponas al vi kelkajn temojn kiel sugestojn pri artikoloj por venontaj numeroj de Kontakto. Sentu vin libera ankaŭ por fari proponojn. Ni bonvenigas vian partoprenon!

Jen sube la aktualaj temo-sugestoj: (pliaj detaloj pri ili troviĝas en nia retejo kontakto.tejo.org)

#Facila teksto

Kontakto ĉiam bonvenigas faciligajn artikolojn pri kiu ajn temo. Detalojn kiel verki faciligve legu en nia retejo.

#Ekologio

Troa poluado, transgenaj manĝaĵoj kaj klimatsanĝigo. Kiel protekti la biodiversecon, la endanĝerigitajn speciojn kaj la naturajn mediojn? Kiuj estas la nuntempaj teknologiaj solvoj por la naturprotektado?

#Konsumismo

Ĉu vi aĉetas superfluaĵojn? Ĉu konsumismo helpas disvolviĝon aŭ malsanigas la socion?

#Drogoj

Kiel oni konsciigi pri iliaj danĝeroj? Ĉu la malpermeso estas efika? Ĉu laŭleĝigi ilin estas la plej bona solvo?

#Recikligo kaj rubaĵoj

La destino de rubaĵoj estas akuta problemo en nia nuntempa socio. Recikligo fariĝas pli kaj pli grava kaj necesa en la mondo.

#Tabako

Malgraŭ la nuntempa provo sieĝi ilian reklamadon kaj konsumadon, cigaredoj estas unu el la plej vendataj produktoj en la mondo.

#Polemikaj tradicioj

Ĉu en via lando aŭ regiono ekzistas polemikaj tradicioj, kiuj ne plu kongruas kun la ĉirkaŭaĵo aŭ kiuj vekas kritikaĵojn el parto de la socio?

#Astrologio

Sciencistoj rigardas la stelaŭguradon kiel ŝajnskioncon aŭ superstiĉon. Kaj vi, kion vi opinias pri la temo?

#Hejmbestoj

Kian rolon havas la hejmbestoj en la homa vivo?

Limdatoj

Jen la kontribuaj limdatoj por ĉiuj venontaj numeroj:

2012:1 – 1 ^a de februaro	2012:4 – 1 ^a de aŭgusto
2012:2 – 1 ^a de aprilo	2012:5 – 1 ^a de oktobro
2012:3 – 1 ^a de junio	2012:6 – 1 ^a de decembro

Nanne Kalma

"Muziko estas ĉiam interne de mi"

ROGENER PAVINSKI (BRAZILIO)

Nanne Kalma muzikumas jam de 40 jaroj. La frisa kantisto kaj komponisto jam partoprenis en dekoj da muzikgrupoj kaj lanĉis aliajn dekojn da albumoj en multaj lingvoj. Lia Esperanta ensemblo Kajto estas unu, se ne la plej elstara muzikgrupo en la Internacia Lingvo. Pro ĝi, esperantistoj konas lin kiel folkloran muzikiston. Kantante pri la maro, ŝipoj kaj laste eĉ pri trajnoj, li tamen komencis frue kiel rokmuzikisto en la grupo 'Pugh's Place,' fine de la 60-aj jaroj.

Kajto estis 4-persona Esperanto-muzikgrupo, kiu ekestis en Frislando, provinco en la nord-orienta parto de Nederlando en januaro 1988. De sia komenco la grupo jam koncertis en multaj landoj, ne nur por Esperanto-publiko kaj ankoraŭ kvarope eldonis kvin kompaktdiskojn: 'Kajto (Flugdrako)' en 1989, 'Procesio Multkolora' en 1991, 'Tohuwabohuo' en 1993, 'Masko' en 1999, kaj "Lokomotivo rulu nun!" de 2004.

Nanne Kalma, Ankie van der Meer, Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse, krom Kajto, antaŭe kunludis ankaŭ en la frislingvaj 'Kat yn 't Seil' kaj 'Liereliet'. Sed tiuj grupoj finiĝis kaj nuntempe Kajto estas nur duopo. Post foriro de Marita kaj Marian, Nanne kaj Ankie daŭrigas Kajton kaj lanĉis antaŭnelonge la 6an albumon de la grupo: "Duope" de 2011.

Pri Kajto kaj lia muzika kariero, Kontakto intervjuis Nanne Kalma, kiu dum la lastaj 11 jaroj (2000-2011) lanĉis 12 albumojn. Ne hazarde li diras, ke muziko ĉiam estas en lia kapo – kaj feliĉe, en ĝi ankaŭ ne mankas ideoj por la estonto.

En kiom da grupoj vi partoprenis, kaj kiom da albumoj vi registris en via kariero?

En 1965 kun kelkaj amikoj mi komencis ludi en mia unua rokbanda 'The Example'. Post kelkaj jaroj ni ŝanĝis la nomon al 'Pugh's Place'. La bando ekzistis

ĝis 1970 kaj ni faris 2 albumojn. Fakte nur unu albumo de la bando estis eldonita oficiale kaj la alia estis viva surbendigo. Ĝi estis farita sen nia scio, ne vere kontraŭleĝe sed tamen iomete strange. De 1970 ĝis 1972 mi ludis en folkbanda 'Farmers Union', ni faris unu

albumon. En 1999 aperis skatoleto kun 2 KD-oj kun ĉiuj surbendigitaj kantoj de 'F U'. De 1972 ĝis 1976 mi ludis en skifla[1] grupo 'Plok' kaj ni ne surbendis ion. Kun ĉiuj supre menciitaj grupoj ni kantis en la angla lingvo. En 1975 mi volis kanti en la frisa lingvo kaj kun kelkaj amikoj mi komencis la grupon 'Irolt'. La grupo ekzistis ĝis 1987 kaj ni faris 7 albumojn. En 1980 mi invitis Ankie partopreni en la grupo. En 1994 ĉiuj kantoj de Irolt estis eldonitaj sur 4 KD-oj en skatolo kun kantlibro. En 1985 kun aliaj amikoj ni havis projektgrupon, 'De Rju nommele Hearen', por la Frisa Kultura Festivalo. Ni faris unu albumon.

En 1986 mi komencis ludi kun Ankie kaj Marita & Marian. Komence ni uzis la nomon 'De Perelaar' de la malnova grupo de M & M. Poste ni ŝanĝis la nomon al 'Kat yn 't Seil'. Uzante la nomon 'De Perelaar', ni faris du albumojn. De pli-malpli 1986 ni ankaŭ kantis en la mar-kanta grupo 'Liereliet' kaj kiel 'Kat yn 't Seil' / Liereliet' ni faris 3 albumojn. 'Liereliet' ekzistis ĝis



Nanne Kalma ankaŭ estas muzikinstruisto

2002 kaj 'Kat yn 't Seil ĝis 2007.

Kun la projekt-grupo 'De Heeren Zeventien' mi faris KD-on pri la historio de la ŝipo 'Batavia' en 1990, kaj poste en 1995 ni denove surbendigis la saman projekton por nova KD, nun ankaŭ kun la membroj de 'Kat yn 't Seil / Liereliet'. En 1987 'Kat yn 't Seil' elektis duan nomon por la grupo; por la Esperanto-repertuaro ni komencis uzi la nomon 'Kajto'. Ankie kaj mi ankoraŭ uzas tiun nomon ĉi-momente. Mi pensas ke la lasta koncerto de Kajto-kvarope estis en 2007. Kvarope ni faris 5 KD-jn. En 1998 speciala KD estis eldonita kun kantoj de mi en diversaj lingvoj, luditaj per diversaj grupoj.

En 1999 'Kat yn 't Seil' faris specialan KD-on kun virĥoro, la sama ĥoro, kiu ankaŭ kantas kun ni en nia 'Eŭropo Trilogio'. De pli-

malpli 1999 Ankie kaj mi komencis ludi kune pli kaj pli kaj ni ankaŭ komencis surbendigi duope. De 2000 ĝis 2011 ni eldonis 12 KD-ojn: 4 en la frisa lingvo, 4 en la nederlanda, 3 en la angla kaj unu en Esperanto, uzante la nomojn 'Nanne & Ankie', 'Nan'n Ankie', 'Ankie & Nanne' kaj 'Kajto'. De la 90-aj jaroj ĝis nun, mi havas skiflan grupon - 'Donnie Lonnie' - kun variantaj muzikistoj, kiu ludas de tempo al tempo. 'Donnie Lonnie' neniam surbendigis ion sed sonas kiel 'Ne permesas Panjo' sur nia 'Kajto Duope'-KD.

por dancigi la publikon. Ni prefere ŝatas fari novajn kantojn. Ni volis fari projektojn ankaŭ kiam ne estis sufiĉe da mono. Kompreneble M & M ne ĉiam povis partopreni en tiuj projektoj: multe da provludado dum longa periodo kaj malmulte da mono.

Do ankaŭ Ankie kaj mi komencis ludi kune kaj tial malpli da tempo restis por ludi kvarope. Post kelkaj jaroj, ni konstatis ke la kreskado de nia kuna repertuaro stagnas, dum la repertuaroj de kaj Nanne & Ankie kaj M & M sufiĉe kreskis. Do tiam venis la momento esti konsciaj

kaj decidi ĉesigi nian kunlaboradon en 'Kajto' kaj 'Kat yn 't Seil'. Nia lasta kvaropa Kajto-koncerto kompreneble ne okazis en la sama momento de nia lasta Kat yn't Seil-koncerto sed estis en la sama periodo.

"Post kelkaj jaroj, ni konstatis ke la kreskado de nia kuna repertuaro stagnas"

Ĉu laŭ vi, la maloftaj koncertoj en Esperanto kontribuis por la disigo de Kajto?

Kompreneble jes. Ni ne nur kantas Esperant-lingve. Kiam ni estas invititaj fari koncertojn kun niaj aliaj repertuaroj en aliaj lingvoj, tiuj repertuaroj kreskas kaj ne la 'Kajto'-repertuaro. Estas la sama por Ankie kaj mi. Jam dum kelkaj jaroj ni volis fari novan Kajto-KD-on, sed ni havis sufiĉe da aliaj projektoj. Ni atendis la ĝustan momenton. En

Kial Kajto, post pli ol 20 jaroj kune kiel kvaropo, disiĝis?

Estis laŭgrada procezo. Marita kaj Marian ludis ankaŭ duope jam de la 80-aj jaroj. Ili devis vivi per muziko. Ankie kaj mi, ni instruas dum 3 tagoj semajne. Ni neniam estis tute dependaj de la koncertoj. Ankaŭ M & M volis fari alian repertuaron kiel Ankie kaj mi. Pli ol ni ili ŝatas tradiciajn kantojn kaj muzikaĵojn

RECENZO



★★★

DUOPE

Kajto

Foklora

14 titoloj – Windrose 2011

DUOPE KAJ DUONE

Kajto estas kvazaŭ "monda kultura heredaĵo" de Esperantujo. Kiu alia esperantlingva artisto sukcesis ĝis nun lanĉi 6 albumojn laŭlonge de bela kariero? Ekde 1988 Kajto mirigas la esperantistojn per sia rava kaj kvalita folkloro muziko de Frislando. Ili ja estis la unuaj, kiuj lanĉis kompaktn diskon en Esperanto. Sed por tiu ĉi albumo Kajto ne plu estas la originala kvaropo, kiu konsistigis la grupon en la pasintaj 5 albumoj. Marita kaj Marian, nun en la grupo Kapriol', forlasis Kajton, tiel ke ĝi koncentriĝis en la duo Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer, kiu decidis daŭre uzi la nomon, kiu firmiĝis en la koro de la esperantistoj.

Tamen "Duope" bedaŭrinde ne sukcesis teni la saman kvaliton, kiun oni trovas en la aliaj albumoj de la grupo. Ĝi estas tre malproksima de la klasikaj "Procesio Multkolora" (1991) aŭ "Tohuvabohuo" (1993). La malĉeesto de Marian kaj Marita estas facile rimarkebla – ja duono de la grupo ne ĉeestas. Kiel koncepti Kajton sen la magia bekfluto de Marita kaj

la lerta akordiono de Marian? Por ne menci la voĉojn. Ĉio ĉi antaŭe donis al Kajto unikan sonorecon, kiu nun en "Duope" mankas.

Kompreneble, ĉeestas la talento de la duo Nanne kaj Ankie, kiu sukcesas atingi nian koron per kanzonoj kiel "Rave kun vi" kun ĝia alloga refreno kaj la bela "Surbordigitaj". Sed ne sufiĉe por tio, kion oni atendas el Kajto-albumo. La sono de la instrumentoj estas iel kaŝita en simpleca miksiĝo kaj la rezulto estas ke plejmulto el la kanzonoj sonas iom pala kaj sensala. La grafika parto estas simpla, sed funkcia. En la libreto, ili konservis la bonan kutimon aldoni resumon de ĉiuj kantotekstoj en kelkaj lingvoj.

La vero estas ke "Duope" estas albumo de Nanne kaj Ankie, kiuj plenrajte decidis uzi la nomon Kajto, ĉar ĝi estas facile rekonata kaj grava. Mi tamen demandas min ĉu ne estus pli logike konservi la gravan postlasaĵon de Kajto kaj ekuzi novan nomon. Ordinara kajto tipe konsistas el pluraj stangoj, kiuj firmigas ĝian strukturon. Duonigita Kajto ne povas alten flugi.

Rogener PAVINSKI



De 1988 ĝis 2007, Kajto kiel kvaropo, lanĉis 5 albumojn en Esperanto



La kanzono "Mi memoras", el la unua KD de Kajto, rakontas kiel Nanne ludis per kajtoj dum sia infanaĝo

2010, Flo (Floreal Martorell, estro de la diskeldonejo Vinilkosmo) invitis nin por 'FESTO' kaj ni ankaŭ estis invititaj por aliaj koncertoj en Francio kaj Belgio. Tiuj invitoj estis la instigaj okazoj por verki novajn kantojn por nia nova 'Kajto'-repertuaro. Kaj kiam ni estis invititaj por la UK en Kopenhago, ni decidis eldoni nian novan KD-on.

Ĉu ekzistis komuna repertuaro inter Kajto kaj 'Kat yn't Seil'?

Jes, certe. Kompreneble, la instrumentaj bazoj. Kaj ĉiam en la koncertoj de 'Kat yn't Seil' ni ludis 1 aŭ 2 kantojn Esperantlingve kaj ofte en 'Kajto'-koncertoj ni kantis kelkajn kantojn frise aŭ nederlandlingve.

Marita kaj Marian kuniĝis kun du aliaj muzikistoj en nova ensemble



Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer

"Kapriol". Ĉu vi pensis ankaŭ aliĝi al aliaj muzikistoj?

Ankie kaj mi, ni ŝategas koncerti duope. Do ĉi-momente ni ne pensas formi novan grupon. Sed por projektoj: Jes, ni povus aliĝi al aliaj muzikistoj.

Ĉu la kanzonoj el "Duope" estis ĉerpitaj el albumoj, kiujn vi registris kiel "Nanne & Ankie" en

"Ankie kaj mi decidis daŭre uzi la nomon 'Kajto'. Por mi la nomo 'Kajto' estas grava simbola nomo."

aliaj lingvoj? Kiel vi elektas vian repertuaron?

Jes, por kelkaj kantoj el 'Duope' mi tradukis la tekstojn el la frisa lingvo. Antaŭe mi neniam volis traduki. Mi nur volis kanti kantojn en iliaj originalaj lingvoj. La unuan fojon, kiam mi tradukis tekston, estis antaŭ dek jaroj, kiam mi tradukis 'Pupoj' en la frisan lingvon. Ankie kaj mi ĉiam ludis 'Pupoj' en niaj ne-Esperantaj koncertoj kaj multaj homoj volis scii pri la kanto kaj la teksto. Do, mi tradukis ĝin kaj elektis novan Esperanto-kanton por niaj koncertoj. Nun mia sento pri tradukado estas ŝanĝita. Niaj frisa kaj Esperanta repertuaroj estas por malgranda publiko kaj tiuj publikoj ne estas la samaj. Do mi pensas ke en futuro mi pli ofte volas fari tradukojn, ankaŭ el nia propra Esperanto-repertuaro en la frisan.

Esperanto-repertuaro. Marian kaj Marita diris al ni ke la nomo estas nia kaj ili ne havas problemojn se ni uzas ĝin; Ankie kaj mi decidis daŭre uzi la nomon 'Kajto'. Por mi la nomo 'Kajto' estas grava simbola nomo.

Ekde kiam vi kaj Ankie van der Meer estas kune? Ĉu tio helpas aŭ malhelpas la muzikan karieron?

Ni kune ludas de la jaro 1980, kiam Ankie komencis kanti en la grupo 'Irolt'. Duope ni ludas plimalpli de la jaro 1999. Ni estas geamantoj de la jaro 2002 kaj ni loĝas kune de decembro 2006. Ni ne geedziĝis, sed ni multe amas unu la alian. En nia kazo, esti kune ege helpas nian muzikan karieron.

En la komenco de la kariero, vi partoprenis en rok muzika progresiva grupo, "Pugh's Place". Kiel okazis la migrado tra la muzikistiloj ĝis la etna kaj folkloro muzikistilo? Ĉu vi ankoraŭ ŝatas rok muzikon? Kian muzikon vi aŭskultas hejme?

La periodo de 'PP' estis fantazia. Kompreneble, ni ludis kelkajn fojojn



Blogo pri heroo | kulpulo

Johano, kiel kutime parkis sian kamionon en la alta parto de la strato. Li, jam tre laca pro la longa vojaĝo, desaltis el la veturilo kaj iris hejmen. Estis tre malfrue kaj la kvartalo jam estis dormanta.

Post kelkaj minutoj, la kamiono, eventuale malbone bremsita, komencis malsupreniri laŭ la strato.

Hazarde, neniu piediris nek ĉeestis tie kaj la kamiono koliziis kontraŭ aro da rubuoj. Bonŝance nenio okazis krom bruoj kaj kelkaj difektetoj en tiuj ujoj kaj en la kamiono. Nur malgravaj damaĝoj, kiuj estos senprobleme kovritaj fare de la asekura kompanio.

La postan tagon, Johano estis famulo siakvartale. Homoj amuze komentis la noktan promenadon de la ŝarĝaŭto. Dum la tuta tago, oni mokdiris al li: "Johano, kie estas via kamiono?" kaj ĉiuj donis al li afablajn frapetojn sur la ŝultro.

Vespere, kiel kutime, li iris al la trinkejo. Tie, la amikoj akceptis lin kiel la okazaĵan heroon. Kompreneble, li kore invitis trinki la amuzitajn amikojn kaj ili ĉiuj kantis kaj amuziĝis, ĝis Marko, la trinkejestro, avertis ilin, ke jam estas la ferma horo. Brueme, ili disiĝis kaj iris hejmen.


Johano, kiel kutime parkis sian kamionon en la alta parto de la strato. Li, jam tre laca pro la longa vojaĝo, desaltis el la veturilo kaj iris hejmen. Estis tre malfrue kaj la kvartalo jam estis dormanta.

Post kelkaj minutoj, la kamiono, eventuale malbone bremsita, komencis malsupreniri laŭ la strato.

Hazarde, Maria, ĝuste en tiu momento, estis trapasinta la straton preter la rubuoj kun sia bebo en siaj brakoj. La bebo subite malsaniĝis, kaj vidante, ke li havas tre altan febron, ŝi decidis porti lin al la hospitalo. Malbonŝance, la kamiono mortigis tuj ambaŭ.

La postan tagon, Johano estis famulo siakvartale. Homoj, teruritaj pro la okazaĵo, komentadis la noktan tragedion. Dum la tuta tago, oni flustris lian nomon, sed neniu emis alparoli nek tuŝi lin. Tamen, Johano bonvenigintus brakumon.

Vespere, la trinkejo estis duonmalplena. La malmultaj ĉeestantoj komplete rigardis Johanon, kiu eniris tute sola, kaj malparoleme trinkadis en la malluma eja angulo. Je la ferma horo, Marko ne kuraĝis averti la ununuran klienton, kiu, silente kaj kapkline, ankoraŭ restis ĉe li.





En la kristnaska tago de la jaro 1991, dum cerimonio elsendita trasatelite tutmonde, Miĥail Gorbaĉov oficiale anoncas ke, post 69 jaroj, USSR finiĝis. La Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj aŭ Sovetunio, kiu dum la lastaj jaroj kunigis 15 respublikojn, estis la plej granda lando de la planedo, kovrinte sesonon de la Tera surfaco.

La sistemo, kiu regis Sovetunion dum tiom da jaroj, fine kolapsis, kaj la rezulto estas ke socialismo nuntempe havas tre malbonan

reputacion. Certe ne helpis la spertoj pri la totalismaj reĝimoj, kiuj alkroĉiĝis al tiu unupartia politika sistemo, kiel tiu de Josif Stalin (1927-1953), kiu decidis simple ekstermigi ĉiujn realajn aŭ potencajn malamikojn. La muro falis, la homoj kredis je kapitalismo, sed post la ekscitiĝo kun la Okcidento, venis frustrigo kun la sekvoj de tiu alia sistemo, kiu hodiaŭ permesas ke unu miliardo malsatu. Kiun alternativon oni havas? Ĉu la mondo estas senelirejo?

Ŝanĝiĝis la sistemo, sed la regantoj kaj povuloj restas esence la samaj. 20 jarojn poste, miloj da homoj nun iras surstraten en la plej grandaj protestoj ekde la fino de Sovetunio. La rusoj kritikas la koruptadon, trudemon kaj la supozeblan trompon en la balotoj por la parlamento, gajnitaj de la partio de Putin, kiu, ŝanĝante nur la oficon, regas Rusion jam de 12 jaroj. Li nun planas reveni venontjare kiel prezidanto. Ĉu la popolo permesos? ■

Dmitri Breĉalov



La rezultoj de la elektoj en la Rostova regiono laŭ informoj de Centra Elekta Komisiono montras la totalan sumon je 146.47%. Kiel konsekvenco la rusoj organizis la plej grandan publikan manifestacion post la fino de socialismo antaŭ 20 jaroj



Ĉu Okcidenten, ĉu Orienten?

VASILE GAVRILAN - MOLDAVIO

Notinda parto de la loĝantaro de Moldavio ankoraŭ nuntempe bedaŭras la disfalon de Sovetunio. La plejmulto el ili estas alilandanoj, kiuj elektis daŭrigi sian vivon en la nova lando – rusoj, ukrainoj, gagaŭzoj (turkida popolo, kiu havas aŭtonomion en la suda parto de Moldavio) kaj



Multaj moldavianoj bedaŭras disfalon de Sovetunio kaj atendas regajni prosperon

aliaj malplimultoj ruslingvaj. Sed troviĝas ankaŭ kelkaj moldavoj kiuj dividas la saman bedaŭron. Ilia aro konsistas el maljunuloj, kiuj vivadis la plej grandan parton de sia vivo en socialismo.

Oni povas kompreni tiun situacion dumaniere: Unue, ĉar ĉia memoro aŭ travivaĵo de la juneco delonge pasinta plikariĝas en la pensiga maljuneco – Tia estas homa kondiĉo, ne nur moldavia. Due, ĉar tiuj homoj troviĝis en pli longa periodo subpremataj de la komunista propagando kaj ideologio. Do ili ĝenerale pli malfacile komprenas kaj akceptas alian homarordon, aliajn valorojn aŭ ĝuste la liberecon pensi alie. Aŭ pli reale, la nostalgio de USSR povas esti komprenata kiel konsekvenco de la malriĉeco kiun travivas nun Moldavio.

Ĉiuj unuopaj industrioj el ĉiuj 15 landoj de Sovetunio estis tiamaniere aranĝitaj



Moldavio en 1985

ke ili dependu unu de la aliaj, tiel ke ili ne povas memstare evolui. Tial, kiam Moldavio gajnis sian sendependecon en la 27-a de aŭgusto 1991, ĝia ekonomio disfalis neeviteble. Bedaŭrinde oni proklamas ke la prosperon, kiun Moldavio havis antaŭ la sendependeco, oni eĉ hodiaŭ ne sukcesis regajni.

Ĉiuj revolucioj (kiel la disfalo de Sovetunio) alprenas neeviteblan malstabilecon politikan, ekonomian, socian ktp. La saman aferon oni hodiaŭ spektas okazi ankaŭ en Libio kaj en la landoj de Mezoriento, skuitaj de la politikaj ŝanĝoj. La dramo de Moldavio estas ke tiu transiro daŭras pli longe kaj pli dolorige ol oni povis antaŭe prognozi. Tiu situacio eblas pro la moldavia socia malunueco. Do neniu plu estu mirigita ke granda parto de la moldavianoj eĉ hodiaŭ ne scias kion deziri aŭ kien iri, ĉu Okcidenten, ĉu Orienten. ■

Multfoja reviviĝo laŭlonge de unu vivo

TRADUKIS: SERGEO TYRIN – ISRAELO

En USSR la ĉiutaga vivo baziĝis sur ŝtata mensogado kaj subpremo de sociaj "elementoj". La Vivo malantaŭ la fera kurteno, pri kiu la okcidentaj landoj dum pluraj jaroj apenaŭ havis nocion. Kiel simple transvivi en tiu freneza realo, iom senvualigas ĉi tiu biografia rakonto de virino, kondamnita al ĉiama juĝateco pro ne-faritaj krimoj de sia patro kaj naskiĝo kun "ne-taŭga" nacieco.

La aksiomon de Exupéry [1], ke "ni ĉiuj devenas el la infanaĝo", ne kontestas eĉ la psikoterapiistoj, kiuj diras ke niaj problemoj en la plenaĝo radikas ĝuste tie – nur atingi la fonton, kaj la homo ekstaros de la sofo renovigita. Ne kuŝigu min sur la sofon. Mi volas vidi kaj scii nenion el tio, kion ŝparis al mi la mizerikorda memoro. En mia memoro ekzistas faŭko, en kiu estas entombigitaj la radikoj de miaj anim-problemoj. Estu benata la kuraca forto de la forgeso, kiu donis al mi la eblon kreski kiel sufiĉe normala, vigla, ĝoja knabino.

Mi sufiĉe multon kaj detale memoras el tio, kio estis "antaŭe", kaj en la aĝo de 3 jaroj mi jam klare distingis min de la ĉirkaŭanta mondo, kiel la plejmulto de normalaj infanoj. La amnezio komenciĝis la 3-an de oktobro 1937, kiam mi iĝis 4-jara kaj mia patro 34-jara: ni naskiĝis en la sama tago. Ekde tiu ĉi tago kaj dum plena jaro poste – nur blanka makulo. NENIO! Post kelkaj jaroj, kiam mi fortiĝis anime kaj emocie, oni rakontis al mi kio okazadis en tiu tempo. Tiuj rakontoj iĝis por mi informo, tre dolora, sed nur informo, ne komparebla kun la



emocie-detruaj travivaĵoj.

Nun mi klare scias, ke mian patron, Viktor Grigorjeviĉ Magazinier, ĉef-inĝenieron de la leningrada fabriko "Bolŝevik", sendis al la morto persone Stalin, Molotov, Kaganoviĉ kaj Voroŝilov jam en februaro 1938, kaj lian pli aĝan fraton Aleksandr unu monaton pli frue. Singarde oni rakontis al mi pri la forvojaĝo de panjo kaj frato (tion, imageble, mi devus memori; sed ne). Pri tio ke dum unu jaro mi aspektis kiel "malakcelita" [2], kaj nenion demandis. Cetere, ankaŭ pli poste mi nenion demandis.

Jakov Fjodoroviĉ Zolin, lia edzino Sonja – la fratino de panjo, kaj iliaj gefiloj iĝis mia dua familio kaj pluraj periodoj el mia vivo

ligiĝas kun ili. Foje... mi memoras tion klare, kvazaŭ tio okazus hieraŭ: infanĝardeno, tag-fino. Baldaŭ alvenos Sonja kaj prenos min hejmen. Finfine oni vokas min: "Nataŝa, paĉjo venis!"; kaj mi frostas surloke, mia infana animo momente ŝtoniĝis. Sed tuj, trankvile mi klarigas al mi mem: "Ne, ne estas paĉjo. Estas Jaŝa (tiel mi nomis Jakov)". Tiam mi havis ses jarojn. Kaj tiam mi jam certe sciis ke paĉjo ne venos. Neniam venos.

Sur pado al Murom

Dum aŭgusto-septembro 1941 la ĉefa inĝeniera-teĥnika kaj labora personaro de la leningrada fabriko №5 estis evakuita al la regiono de Murom (300 km oriente de

Moskvo). Jam en la unua tago de la milito, Jaša enregistriĝis kiel volontulo por batali; sed li estis ordonita evakuigi la fabrikon kaj tuj komenci provizadon per armiloj por la fronto.

En 1946 la familio Zolin kune kun avinjo revenis al Leningrado. Tiujare mia frato Volodja finstudis la 10-an klason, sukcesis en la ekzamenoj, estis akceptita kaj ricevis lokon en la studentloĝejo. Dumsomere li venadis viziti nin. Poste, kiel kutime neatendite, venis la malfeliĉo.

Foje dum la somero de 1948, panjo kiel kutime vojaĝis al Murom "markiĝi"[3]; ŝi revenis kun malĝoja informo: ŝi estis instruiciita maldungiĝi de la laboro kaj foriri al Norda Kazaĥio. Ni abrupte estis forplukitaj el ne-nia vivo, kaj revenigitaj en la antaŭan, veran, kie ĉiu ricevu laŭ sia etikedo – FAMP (famili-ano de malamiko de la popolo). Tiel ke ni ne forgesu pri "nia loko". Ĝis Moskvo mi kaj panjo veturis kune, renkontiĝis kun Volodja, kaj denove adiaŭis: mi al Leningrado kun la Zolin-oj por daŭrigi la studadon, panjo – al nesciata loko, kien el la stacidomo forveturis var-trajnoj.

La amata urbo

Mi revenis en mian urbon, kie mi naskiĝis kaj vivis dum sep kaj duona jaroj. En Leningrado regis mizero; ne la malriĉeco, al kiu ni al kutimiĝis, sed reala mizero. Mi estis tutsenca "superflua buŝo" kaj Jaša, kiu tiam studis por universitata diplomo, devis forlasi la studojn kaj eklabori en fabriko. Ĉiuj antaŭ-militaj mebloj estis, kompreneble, forbruligitaj dum la Blokada de Leningrado far germanoj.

Filo de kamparano, inĝeniero-ekonomiisto, elstariĝinta el sia rondo, Jakov Fjodoroviĉ Zolin havis du neforigeblajn makulojn en sia alikaze senriproĉa biografio: edzinon-judinon kaj filinon de dispafita malamiko de la popolo, kiun li amis kaj kreskigis kiel sian propran, esperante adopti ŝin, tiel donante al ŝi alian naciecon kaj alian socian statuson. Sed kvankam mi tre amis lin, mi traktis tian paŝon kiel perfidon de mia paĉjo.

Leningrado ankoraŭ ne renormaliĝis de post la milito, kies spuroj estis videblaj ĉie. Mi kaj



Sonja staradis en longegaj vicoj por produktoj; la akirado de terpomoj kaj aliaj legomoj estis nun mia devo. Mi kaj ŝi ĉefe nutris nin per griza pano, terpomoj kaj makaronioj. Butero kaj aliaj delikataĵoj estis rezervitaj por la pli junaj gefiloj: ili bezonis kreski. Panjo tiam per nenio povis helpi. Ŝiaj leteroj estis malfacilaj – en Norda Kazaĥio, kien ŝi estis veturigita en varvagono ĝis Petropavlovsk, kaj ankoraŭ 136 kilometrojn en kamiona karoserio ĝis la vilaĝo Kornejevka, ŝi estis asignita al kamparaj laboroj. Dum la noktoj, relegante ŝiajn leterojn, mi ploris. Unu tagon ŝi perdis la konscion en la kampo, estis enhospitaligita. Kaj tuthazarde el inter ŝiaj dokumentoj oni trovis unu taŭgan: kiam ŝi estis eksigita el la leningrada universitato pro malproleta deveno, ŝi dum iu tempo studis en instruistaj kursoj. La atesto pri tio savis ŝin: oni donis al ŝi lokon de instruistino en bazlernejo. Ŝi ekricevis monon – el kiu $\frac{1}{4}$ ŝi sendis al Sonja, $\frac{1}{4}$ al Volodja. Ankoraŭ $\frac{1}{4}$ por pagi por la angulo kie ŝi dormis surkofre. Per la restantaj $\frac{1}{4}$ ŝi vivis... Kiamaniere? Mi ne scias.

Kie studi?

En la 10-a klaso, kiam la lasta jarkvarono estis proksimiĝanta al sia fino, mia literatura instruisto petis min resti post la lecionoj; li forprenis el sia teko manlibron "Superaj Lernejoj de Leningrado" kaj enprofundiĝis en ĝian enhavon. Li diris: "Vi devintus iri al Universitato, sed vi ne estos akceptita". Li plej verŝajne ne nur kalkulis je mia "5-a punkto" [4] sed sciis ĉion pri mi (la jam menciita FAMP, famili-

ano de malamiko de la popolo). Finfine ni alvenis al la decido ke la plej sendamaĝa loko estus la Arboteĥnika akademio.

La akceptajn ekzamenojn mi ne timis, sed evidente la ekzamenantino ricevis buŝan ordonon nepre "tranĉi" min en ĉi-lastaj ekzameno: starante ĉe la tablo mi klare respondis ĉiujn demandojn sur la listo; poste ŝi ordonis skribi sur la tabulo aron de formuloj, kion mi faris. Tiam ŝi donis al mi blankan paperon kaj komencis rapide kaj nervoze dikti unu formulon post la alia. Kiom estis? 30? 50? Finfine ĉe unu mi stumblis. Ŝi kontente prenis la nototabelon dirante: "Vi devos serĉi alian fakultaton." Dume mi estis agitiĝe cerbumanta: ĉe "4" mi ankoraŭ havos sufiĉan noton; ĉe "3" mi vere iros al alia fakultato. Ŝi enskribis "неуд." (mallongigo de "неудовлетворительно" = "nekontentige": la plej malalta ebla noto, signifanta plenan nescion de la ekzamena materialo).

En la morgaŭa tago mi portis miajn dokumentojn al la Celuloza-papera instituto, kie ili estis akceptitaj. Kiam la listoj kun matrikuligoj estis pendigitaj, mia familinomo mankis. Rigardante al mi per trankvilaj okuloj, oni klarigis ke miaj analizoj de urino kaj ekskremento estis malfruaj kaj sekve estas neniuj eblo enlistigi min.

Miaj amikoj alarmiĝis kaj elsciis ke en tiuj tagoj funkcias komisiono, trovanta lokon sur la vastaĵoj de Sovetio por malsukcesintoj en la universitatenira konkuro. Tie oni proponis al mi la Instituton de Forstokulturo en Petrozavodsk, Karelo-Finna SSR. Mi senprokraste

sendis miajn dokumentojn. En oktobro ĉiuj miaj amikoj komencis siajn studojn; miaj dokumentoj tamen revenis kun la noto, ke la akcepta komisiono ricevis ilin "tro malfrue".

Racia, Virta, Eterna [5]

En la bela somero de 1953 (Stalin mortis en marto 1953 kaj tuj estis abolita lia personkulto kaj multaj liatempaj malpermesoj), kiam ankoraŭ etskale komencis reveni homoj el la koncentrejoj kaj ekziloj, kiam la nocio de 'malamiko de la popolo' ricevis neaŭdigitan demandosignon, antaŭ la gefiloj de 'malamikoj' la perpleksa ekzekutivo komencis malfermi pordojn. Havante jam du jarojn de laboro kiel instruistino kaj elstaran laborkarakterizon mi certis ke mi povus eĉ akcepti en universitaton, malgraŭ la ne malaperinta 5-a punkto. Kaj mi prezentis la dokumentojn al la Leningrada Ŝtata Pedagogia Instituto, por la fakultato de pedagogio kaj psikologio. En la destinita dato mi trovis en la listo de matrikuloj mian familinomon, apud kiu staris 'elstare'.

Absolute nepre estas rakonti pri tio kio okazis en la printempo de 1957. Iel oni ne tuj rimarkis



ke la kurttempa 'degelo' finiĝas. Mia konato, filo de nia respektata profesoro, invitis min al la universitato por aperta diskuto; la enorma aŭditorio estas plen-plena, ĉiuj estas ekscititaj. Pupitro, kie la studentoj tuj ekprezentos siajn raportojn; tablo, malantaŭ kiu kelkaj dece aspektantaj homoj – ili invitas

la studentojn paroli pri tio kio ĝenas ilin, paroli malferme, sen timo. Ili komprenas ke post la publikigo de eraroj de la periodo personkulta, estas pluraj demandoj. Ne tute klaras kiuj ili estas (kvankam tio devus esti!). La ĉefraporton, pri ekonomio de socialismo, prezentas mia amiko kaj ekflamas arda polemiko, nenion komunan havanta kun ekonomio. La homoj malantaŭ la tablo ne enmiksiĝas, nur aŭskultas. Ekaŭdiĝis pluraj subtenantoj de la "malnova ordo", dum kiu estis tiom da bono – ekzemple egala rajto de supera eduko... "Kio?!" – mi eksaltas kaj rapidas al la pupitro. Ekscitite, koncize kaj precize mi listigas la etapojn de mia 'odiseado' kaj revenas al mia loko, dum min sekvas forta aplaŭdo.

Pri tio, ke temis pri bone planita provoko "por malkaŝado", ni ne tuj divenis. Evidentiĝis ke krom mi ĉeestis la "diskuton" ankaŭ aliaj studentoj de nia instituto, kaj ili sekve kreis rondon por ellabori rekomendojn por daŭra evoluigo kaj plibonigo de la soveta reĝimo. Unu fojon ili invitis min kaj mian amikino al ilia vica kunveno; tiu-vespere dum ni jam estis nin plibeligantaj en la studenta dormoĉambro, subite envenis knabo kaj invitis iri kun li al kinejo. Ni ne persone konis lin – li estis mistera. Onidiroj cirkulis ke en la armeo li servis en "speciala sekcio". Do, sen ajna preteksto li vokis nin al kinejo. Ni, kompreneble, klarigis ke oni atendas nin aliloke, sed li insistis, kaj ankaŭ la kinejo estis pli alloga. Post kelkaj tagoj ĉiuj ĉeestintoj de tiu kunveno estis arestitaj. La kino-umado savis nin. Evidente ke dank' al ligoj al lia inta (aŭ anta?) servo li sciis tion anticipe, kaj kial li decidis nin savi – restas malferma demando.

Spirhalto

Mi tre ŝatis mian laboron en la internulejo, kaj la infanojn. Mi sciis ke mi estas faranta vere gravan aferon, kvankam kontraŭ mizera pago. Sed ne estis restanta tempo por simple vivi. Mallonge for de nia domo troviĝis unu el la multnombraj Scienc-Esploraj Institutoj, kie estis bezonataj laborantoj. Kiom ajn tio



"Panon al patrujo!"

sonas strange, mi tuj estis akceptita por posteno de "inĝeniero"! Mi havis bonajn rilatojn kun la laborantoj de la kopia fako, kaj ni kopiadis tie poemojn de Gumiljov, Mandelŝtam kaj aliajn malpermesitajn materialojn. Hejme kuŝis ĉe mi kopio de "Doktoro Ĵivago", mi kutime lasis la ŝlosilon en antaŭdecidita loko, kaj ne malpli ol dudek homoj legis ĝin; neniu denunciis al la aŭtoritatoj (tiutempe unu lektoro, ĉe kiu oni trovis unu folion de la anglalingva teksto, estis sendita koncentrejon). Sed tia idilio ne povus daŭri longe. Unu tagon vokis min la estro de tute alia fako kaj avertis ke "oni scias" pri miaj rilatoj kun la kopimaŝino kaj ke li persone insiste rekomendas al mi trovi alian laborlokon.

Pri justuloj en Sodomo

La patrujo-duonpatrino faris ĉion eblan por ke ni plej facilanime povu disiĝi de ŝi. Kvankam mi jam maldungiĝis, mi – kiel ĉiuj – devis trapasi 'malvarman duŝon' en mia buroo: sen laborkarakterizo la peto-dokumentojn pri permeso elvojaĝi oni ne akceptis. Mi ankaŭ trapasis lango-vipadon en la partia kunsido en la lernejo, kie mi jam 14 jarojn ne laboris, post kiam mian bopatrino trafis koratako. Ili nek havis kompaton al mia maljuna patrino, kiu estis devigita viziti instancojn kaj subskribi permesojn por mi – plenkreska – forvojaĝi. Ĉiu

burokrato, “kunsente”, diradis al ŝi, kian maltaŭgan filinon ŝi kreskigis, kiu lasas ŝin en ŝia maljunaĝo (kvazaŭ ni ne sciis sen ili ke tiu ĉi disiĝo estos por ĉiam); sed la muskaptilo povus ĉiun momenton ŝlosiĝi – kiel baldaŭ ja okazis – kaj senprokraste ni devis forvojaĝigi la infanojn. Alia eliro ne ekzistis.

Restis la lasta aflikto – en la dogankontrolo. Sciante ĉion plej intiman pri ni, ili ne serĉis ĉe ni oron aŭ diamantojn. Ili kontrolis niajn librojn serĉante malpermesitajn materialojn, ne permesis kunpreni nigra-blankan foton donacitan de amikoj. Mia dua filo tiam ĵus iĝis unu-jara. En eta valizo mi kunprenis pispoton, vindaĵojn, suĉilojn... Kaj jam antaŭ la flugo: “Valizoj estas malpermesitaj!”. La akompanantaj nin proksimuloj kaj amikoj elprenis siajn saketojn, kaj ni eniris la aviadilon kiel milittempaj rifuĝintoj.

Adiaŭ, paĉjo!

Vi estis dispafita la 3-an de februaro 1938. Vi vivis precize 34 jarojn kaj 4 monatojn. Eble vi eĉ ne sciis ke jam alvenis februaro... Vi atendis la areston ĉiutage, ja la fraton Aleksandr ili jam ‘prenis’ (dispafis la 22-an de decembro 1937). Mi ne scias kiel tio okazis, paĉjo, sed post translokiĝo al Israelo mi ĉesis pensi pri vi; en la senco ke ekde la aĝo 8-9 vi ĉiam troviĝis en mia konscio, troviĝis kiel viva. Eĉ kiam mi jam sciis ke vi delonge ne estas inter la vivantoj. La espero ke tio ne veras ne lasis min ĝis la forvojaĝo mem. Kaj tio havis siajn kaŭzojn: komence, en la infanaĝo, panjo kredigis al si kaj al ni ke vi plej verŝajne enskribiĝis en sankcian roton [6], ĉar antaŭ ĉio vi estis patrioto de via Patrujo. Kaj mi revis, kiel vi aperas en la pordo, vundita, kun ordenoj... Poste, kiam pasis la ebla tempo, mi alkutimiĝis pensi ke vi vivas ie en ekzilo, sed vi havas alian familion kaj vi fortranĉis la pasintecon. Tiaj



“Ni detruu la kulakon kiel socian klason”

kazoj ne malkutimis. Eĉ en la lastaj leningradaj jaroj mi imagis ke dum mi forestas, vi sonorigos kaj la pordon malfermos al vi blondhara knabo, kun samronda kapo kiel la via. Tio ne estas tiom sentimentala kaj naiva kiel ŝajnas. Tio pli precize estas malsano, kiu de fojo al fojo ricevis dozon de nutra narkotaĵo.

En la 60-aj jaroj via filo decidis el Moskvo translokiĝi al Leningrado. Li prenis la dokumentojn al scienca instituto kaj jam tiuvespere emociiĝinte rakontis al mi kaj panjo kiel li venis tien, kie neniu konis lin, plenigis ĉiujn paperojn, kaj jam

estis surmetanta la palton, kiam sur la vasta ŝtuparo ekaperis senspiriginta viro, ekkriante: “Atendu! Vladimir Viktoroviĉ! Haltu!”, malsupreniĝis kaj brakumis lin. “Mi ĉiujn vin ja bone konas. Kaj vian patrinon, kaj patron. Mi vizitis vian domon dum multaj jaroj, eĉ tenis vin surgenue!”. Kaj mi memoras kiom terure paliĝis panjo. Neniam, nek antaŭe nek poste, mi vidis ĉe ŝi tian vizaĝ-esprimon. Jes, ĉio estis vero. Jes, malnova konato. Jes, tenis sur la genuoj. Sed la vero estis ankaŭ la terura, vin akuzanta gazeta artikolo, kiun ŝi tuj klare imagis. Kun la subskribo de tiu homo [7].

Via foto, same kiel de panjo kaj de Volodja, pendas en mia dormoĉambro. Mi rigardas vian vizaĝon, mi ŝatas ĝin, ĝi estas fortkaraktera. Sed ve, ĝi diras al mi nenion pri vi viva. Mi rigardas vian foton kaj ripetadas: “Estas mia patro”. Sed mi ne sentas viajn manojn, ne aŭdas vian voĉon, vian ridon, ne vidas vian rideton, kvazaŭ neniam en sia vivo la homo sur la foto ridetis... Reale vi neniam ĉeestis mian vivon. Vi estas kvazaŭ fantomo. Pardonu min, paĉjo. ■

Aŭtoro: RADOVSKAJA, Natalija Viktorovna

Konciza traduko surbaze de teksto publikigita en la ĵurnalo “Zvezda”, 2008, n.8, kiu siavice estas aŭtoro koncizigo de la samnoma libro “La putito el kiu trinkis”. Eld. AST, Sova, Harvest, 2008, ISBN 978-5-17-055081-4, 978-985-16-5901-8.

[1] Antoine DE SAINT-EXUPÉRY, aviadisto kaj mondfama verkisto.

[2] “Malakcelita” estis norma strata moknomo.

[3] Montri sin ĉe la aŭtoritatoj kaj subskribiĝi en la perioda registro-tabelo, deviga proceduro por ekzilitoj.

[4] Fikonata enskribo de nacieco en la nacia identigilo; en USSR ĝi estis deviga kaj elektebla nur el la listo oficiale rekonita de la ŝtato. Ekzistas multaj atestoj ke surbaze de ĉi-enskribo okazadis diskriminacio de naciaj minoritatoj kiel judoj, germanoj, poloj, tataroj, en la akceptiĝo al superaj lernejoj, al laboro, en kariera kresko, permesoj vojaĝi eksterlanden k.t.p. El tio fontas la ironia esprimo “invalido de 5-a grupo”, signifanta personon havantan ‘netaŭgan’ naciecon.

[5] Aludo al tio kion oni instruis al ĝlernantoj pri tio kion semas la sovetia reĝimo.

[6] Armeaj unuoj, en kiujn estis sendataj soldatoj farintaj krimojn. Ankaŭ civitanoj, interalie akuzitaj pro ‘politikaj krimoj’, povis peti esti senditaj tien anstataŭ la koncentrejo, por “per sango pentofari antaŭ la Patrujo”. La sankciaj rotoj estis lokataj en la unuaj linioj de la fronto kaj la ŝanco pereji estis preskaŭ absoluta. La popolo nomo de la ‘sankciuloj’ estis “kanon-viando”.

[7] La praktiko denunci unu kontraŭ la alia estis instigata far la ŝtato kaj aparte ‘heroj’ estis konsiderataj rakontoj pri gefiloj kiuj denuncis kontraŭ siaj propraj gepatroj – agintaj kontraŭ-sovetie (laŭ la interpreto de la organoj) kaj sekve dispafitaj.



Freneza mondo de Kusturica: Ĉiu trovos lokon por si

STANISLAVO BELOV - RUSIO

Mi ŝatas Kusturica-on. Se diri pli ĝuste, mi ŝatas liajn filmojn, ĉar lin mem mi ne konas kaj mi nur supozas ke li estas sufiĉe interesa homo. Mi al kutimiĝis distingi verkon kaj verkanton, kaj danke al tio mi povas daŭre ŝati kantojn de Sex Pistols, kvankam iliaj kreintoj estis sendube aĉuloj-ĉeĉuloj. Same mi ŝatas la modelinon Naomi Campbell pro ŝiaj gracio kaj esprimivo, kvankam ŝi evidente estas persono tre maltolerema kaj foje eĉ sovaĝeca. Mia edzino ne povas distingi kreanton de ties verko, do ŝi ne ŝatas multon el miaj preferaĵoj. Ekzemple Kusturica laŭ ŝi estas vera frenezulo. Kaj mi ĝenerale konsentas pri tio – jes, kompreneble. Kaj do?

Antaŭnelonge mi spektis trian (por mi) filmon de la fama balkana reĝisoro – “Underground” (Eo: Subterejo). Pri kio ĝi temas? Nu, fakte pri ni mem, almenaŭ pri loĝantoj de iamaj socialismaj landoj – sed ne nur. En ĉi filmo la aŭtoro rakontas vere frenezan (kiel kutime) historion pri grupo da jugoslavaj gerilanoj, kiuj eniris subterejon en la Dua mondmilito kaj daŭrigis sian lukton (pli ĝuste – preparadon al ĝi) dum la sekvaj 20 jaroj.

Ili ne scias, ke la milito jam finiĝis antaŭlonge kaj neniuj minacas ilian landon – ja “surteraj” kamaradoj bone regalas ilin per falsrakontoj. De tempo al tempo ili eĉ ŝaltas

Emir Kusturica [Емир Кустурица] estas serba filmisto. Pro lia grava sekvenco de internacie aklamitaj filmoj, li estas konata kiel unu el la plej kreemaj kino-reĝisoroj de la 80-aj kaj 90-aj jaroj. Li ricevis dufoje la premion “Palme d’Or” ĉe la filmfestivalo Cannes

signalojn de aeratako, post kio ĉiuj subteranoj rapide kuras por kaŝi sin en la sola tanko, konstruita de ili per propraj manoj kaj vane staranta en subterejo kiel defendilo de neekzistanta danĝero. Post la fino de la “bombardo” ĉiuj denove revenas al sia ĉiutaga laboro, plejparte konsistanta en senĉesa produktado de armiloj, kiujn ili sendas supren al la superaj kamaradoj, ricevante interŝanĝe provizojn kaj novajn blagaĵojn.

Ĉu vi rekonas ion? Se jes, verŝajne vi almenaŭ iom partoprenis la vivon en la cirkonstancoj de “reala” (ne libreca-ideeca) socialismo. Dum kelkdekoj da jaroj milionoj da miaj samlandanoj vivis ĉe similaj kondiĉoj. Tio fakte estas universala solvo por ĉiuj totalismaj reĝimoj – ĉu komunismaj, ĉu naziaj, ĉu iuj ajn. Estas ja universala recepto por regi homojn: necesas starigi antaŭ ili komunan kaj timigan malamikon. Se ĝi ne ekzistas, necesas ĝin inventi aŭ almenaŭ ŝajnigi.

Post tio oni povas gurdi la samon dum jardekoj: “Jes, ni vivas mizere, laboras pene kaj ne ĉio iras

glate, nia ŝtato havas certajn malperfektaĵojn, sed... nun minacas nin kruela malamiko, antaŭ kiu ni devas forgesi malnovajn ofendojn kaj kuniĝi por kontraŭstari ĝin. Poste ni ĉion riparos kaj preparos kaj eble ŝanĝos ion entute, sed ne nun, ĉar hodiaŭ ni estas ĉirkaŭitaj kaj ĉiu dubanto estas perfidulo – fi al ĝi!” Kaj por fortigi en la homamasoj tiun mensogon oni funkcias la plej povan en la mondo cerbolavan maŝinon el filmoj, gazetoj, radioelsendoj, paroloj de eminentuloj kaj elstaruloj, ĉieĉeestaj frapfrazoj kaj elpendaĵoj, senĉesaj kongresoj, ritaroj ktp.

Kaj homoj kredas tion! Kaj tio





La filmo "Subgrunde"

dependas nek de lando, nek de aĝo, religieco aŭ etna aparteno. Homoj kredas tion, kio ŝajnas al ili reala kaj evidente komforta bildo de la mondo – almenaŭ ĝi estas komprenebla por ĉiu, sen fari plian memstaran cerbolaboron. Mi konstatas tion, ĉar mi vidas pruvojn ĉiutage en la nuna Rusio. La komunisma ideologio estas ĉi tie konsiderata iaspeca dinosaŭro kaj ne havas gravan influon super la opinioj de la homoj. Gejunuloj pli volonte akceptas anarkiismon aŭ naciismon – ambaŭ ricevatajn precipe el Okcidento, do eĉ sloganojn kaj kutimojn oni kopias de tie.

Sed naskiĝis nova ideologio, kiun kreis manipulistoj de Kremlo, plejparte dum la regado de Putin. Ĝi diras, ke Rusio estis kaj ĉiam estos unu el plej gravaj, bonaj kaj povaj landoj de la mondo. Ĝi ĉiam estis ĉirkaŭita de malamiko, nun tiun rolon ludas kvazaŭdemokratiaj okcidentaj ŝtatoj – unuavice Usono. Ili ne volas akcepti ke Rusio renaskiĝas kaj malgenuiĝas, do provas malhelpi tion. En la lando estas "kvina kolono", konsistanta el veraj perfiduloj, helpantoj de okcidentaj malamikoj. Ili kaŝas sin sub maskoj de rajtdefendantoj, opoziciuloj kaj aliaj liberuloj (vorto preskaŭ sakra en la rusia politika jargono). Jes, nia ŝtato estas ne la plej perfekta en la mondo. Nia ekonomio febras kaj tute dependas de eksportado de nafto

kaj gaso. Niaj polico kaj ŝtatoficistoj estas koruptitaj, balotadoj ne tre demokratiaj, vivnivelo malalta, sed... nun ni ne havas tempon por interbatali. Necesas kuniĝi antaŭ komuna malamiko kaj... (daŭrigon legu supre).

Do saĝnaŝ al mi, ke post 70-jara vivado en subterejo mia lando ne surteriĝis, ne! Ni nur supreniris al plia etaĝo de nia kelo kaj nun daŭre konsideras Suno elektrolampon (nun – energiŝparan). Ŝanĝo konsistas nur en tio, ke nun plejparto de la homoj malkaŝe demonstros sian malamamon al la ŝtatgvidantoj, ŝtatoficistoj kaj sistemo entute. Sed ĉu tio gravas, se ili tamen fakte subtenas ĉion kion ili malamas, daŭre loĝas en subterejo kaj liveras al superaj kamaradoj ĉion de ili bezonatan? Tiel longe kiel tio daŭras, niaj superuloj volonte cedas al ioma murmurado subtere – ja la sistemo funkcias plu.

Kiel eliri el la subterejo? Mi ne scias. Fakte ŝajnas ke Kusturica mem ne scias respondon al tiu demando. Liaj subteranoj liberiĝas kaj komencas novan, feliĉan vivon nur trairinte ĉiujn kruelaĵojn de la enlanda milito kaj fakte mortinte. La ĉefa heroo perdas sian filon, verŝas multe da sango serĉante lin kaj trovas lin nur en la profundo de la putro, al kiu li mem ĵus ordonis konduki militkaptitojn – oni povas diveni por kio.

En la fino de la filmo ĉiuj ĝiaj herooj denove kuniĝas – tamen ne kontraŭ iu malamiko, sed ĉe gaja kaj plensarĝita tablo, dum granda tipe balkana festeno kun dancado-kantado-kriado. Ili estas feliĉaj kaj eĉ menshandikapita knabo forgesis pri sia rulseĝo kaj dancas kune kun ĉiuj. Ili ĝojas, kvankam ilia terpeco flosas, kien ŝajne neniuj scias. Ja por denove naskiĝi necesas unue morti. Ĉu nia putro ankoraŭ atendas nin? Neniu respondos. Kaj koncerne la frenezaĵojn de Kusturica, do plaĉas al mi la vortoj de unu el la subteranoj: "Ni ĉiuj estas frenezuloj. Sed nin oni ankoraŭ ne diagnozis". ■

KOL DISKOJ

ROGENER PAVINSKI



★★★★

Amindaj

Amindaj

Kuba tradicia

8 titoloj – Vinilkosmo 2011

La muzikgrupo Amindaj, devenas el Kubo, kie ĝi estis fondita en 2009. Ĝi debutis dum koncertoj en la tiujaraj UK kaj IJK. Tiam estiĝis monokolektado por helpi al ili registri sian unuan albumon. Ĉi tie jen bonega rezulto, unu plia ekzemplo, ke per kolektiva helpo eblas konkretigi belajn projektojn kiel tiu ĉi.

La unua albumo de la grupo alportas la tipan kuban muzikon al Esperantujo. Ĝian etoson kaj muzikecon la grupo plene transdonas, speciale per konataj kubaj kanzonoj, kiuj estis tradukitaj kaj adaptitaj. La plejparto tamen, de la kanzonoj el la albumo estis verkitaj de Julián Hernández Angulo, konata esperantisto, kiu de multaj jaroj komponas kaj kantas. De li, fakte estas la plej plaĉaj muzikaĵoj en la unua albumo de Amindaj. Ĉar Julian jam registris kasedojn, multaj rekonos kanzonojn kiel "Lasu la malĝojon flugi" kaj "Tiel la mondo iras". Tiuj, akompanataj antaŭe nur per lia gitaro, nun ricevis belajn aranĝojn de la multnombra grupo da junuloj, kiu konsistigas Amindaj.

La kanzonoj povas aspekti kiel iom tro intersimilaj al tiuj, kiuj ne kutimas al la stilo. En ĉiuj aranĝoj aŭdiĝas violono, perkuto kaj la kuba treso, kiu estas trikorda kuba gitaro. La kvalito de la registrado de ĉiuj kantoj estas senripoĉa. El la repertuaro, mi fortranĉus nur "La bambo", sed la fakto ke oni decidis ĝin registri estas tute pardonebla. "Maria" estas la plej melodia kaj iom melankolia, kie rekoneblas la stilo de Julian. – Mi fakte bonvenigus albumon de Julián kun Amindaj. Estus plezure aŭskulti lian voĉon akompanatan de tiu bona ensemblo.

La solaj atentigoj restas pri la misprononco de "ĉ", kiu iom ĝenas kaj pri la iom kaosa prezento de la grupo sur la libreto. Estus pli bone se ili apartigus la muzikistojn de la helpantoj kaj kunlaborantoj, ĉar fotoj de ĉiuj estas miksitaj, kaj oni ne tuj rekonas iliajn rilatojn kun la grupo. Se la grupo estas pli ol nur muzika projekto, bonvenus pli da informoj. Vere gratulinda atingoj kaj ja aminda albumo.

Fajra bato de Vezuvio

OLGA ŠILAJEVA - RUSIO

Italaj vulkanologoj proponis teorion, laŭ kiu la loĝantoj de Pompejo mortis ne pro malrapida sufoko, sed pro forta ondo de ardaĵaj vulkangasoj.

Pompejo estis unu el la tri urboj de la Antikva Romio en la Golfo de Napolo en la imperiestra provinco Italia (hodiaŭ regiono Kampanio, Italio). Pri la erupcio de la vulkano Vezuvio, kiu en la 79-a jaro (p.K.) neniigis Pompejon, la homoj aŭdis multon, sed scias ne ĉion. De jaro al jaro aperadas novaj interesaj eltrovaĵoj kaj faktoj. Do kion sume sciencistoj scias hodiaŭtempe?

Dum longa tempo la loĝantoj de Pompejo vivis en la konvinko, ke Vezuvio estas estingiĝinta, kaj ili ne dediĉis atentemon al avert-signaloj. Ili ne rilatigis tiujn al la aktiveco de Vezuvio. Ili kutimis al etaj ekstremitoj de la tero kaj erupciaĵoj de gaso el Vezuvio. Kiel ni nun komprenas,

ĉi tiuj eventoj atestis pri avanco de magmo al la supraĵo kaj pri ebla baldaŭa erupcio de la vulkano.

Tagmeze la 5-an de februaro de la jaro 62 la loĝantoj de Pompejo neatendite ekaŭdis timindan rumoron. Poste, fortaj terskuoj okazis unu post la alia. Kelkloke aperis profundaj abismoj, en unu el ili trafalis eĉ ŝafaro el 600 ŝafoj. En la urbo ruiniĝis temploj, portikoj kaj loĝkonstruaĵoj, en ruinojn transformiĝis eĉ riĉaj vilaoj. Iomete trankviliĝinte post la terskuoj, la loĝantaro revenis al sia hejmo, kaj la roma senato eldonis specialan dekreton por rekonstruado de la urbo. La pompejanoj, eĉ ne suspektante ke la plej danĝera okazo baldaŭ venos, rekonstruadis domojn, okupis sin pri vendado, ĝuis ripozon en olivaj arbaretoj apud Vezuvio, kiu neniel montris sian vekigon. Tiutempe la premo interne de la vulkano kreskis...



La fama katastrofa erupcio de Vezuvio komenciĝis la 24-an de aŭgusto (nun sciencistoj opinias pri oktobro) de la jaro 79. Je la unua horo post la tagmezo la loĝantoj de Pompejo denove eksentis terurajn terskuojn. Ien malaperis akvo el putoj. Poste la tero ekstremitis, la maro ekondiĝis tre terure. Sed subite ĉio kvietiĝis...

Nur bestoj kaj birdoj antaŭsentis katastrofon. Hundoj bojis, blekis kaj ĵetiĝadis en gregejoj bovoj kaj ŝafoj, ĉevaloj fosis la teron per la hufoj. Ĝis tiu momento, kiam la vivo transformiĝis en teruran morton, restis jam kalkuleblaj minutoj...

La urbo mortis matene de la sekva tago je la sepa kaj duono. Dum la erupcio el la ĉielo faladis cindro kaj pumiko, kiuj finfine superŝutis la domojn ĝis tegmentoj, kaj eĉ ombris la sunon kvazaŭ estas krepusko. Komence el la ĉielo faladis stonetoj (iliaj ampleksoj estis de pizo ĝis juglando) kaj poste – nur cindro. Entute la urbo enteriĝis sub 7-8 metroj.

Poste pluvis kaj la pluvo transformis la cindron en malpuraĵon, kiu por longa tempo kovris la domojn kaj homkorpojn. Iom post iom la korpoj putris, sed tiu spaco, kiun ili iam okupis, restis malplena interne de firma vulkana malpuraĵo. La vulkancindro, kiu kovris la urbon, perfekte konservis la konstruaĵojn kaj objektojn kaj tiel ebligis al ni ekkoni la aspekton de mezgranda urbo de la Antikva Romio kaj la vivon de ĝiaj enloĝantoj.

La lokon, kie situis Pompejo, sciencistoj eltrovis nur en la 17-a jarcento. En la jaro 1777 oni





unuafoje trovis ne nur skeletojn, sed ankaŭ spuron de la korpo sub ĝi. Sed nur en la jaro 1864 Giuseppe Fiorelli [Djuzepe Fjoreli] elpensis kiamaniere oni povos restaŭri la aspekton de mortintoj. Frapinte supraĵon kaj trovinte kavon, kiu restis post la putrado de la korpo, arkeologoj faris malgrandan truon kaj plenigis ĝin per gipso. La gipso fariĝis muldaĵo, kiu ekzakte reproduktis la antaŭmortan pozon de la pompejano.

Tiamaniere estis restaŭritaj centoj da homaj korpoj. Iufoje oni povas ankaŭ ekrigardi la hararanĝojn, faldojn de la vestoj de mortintoj kaj eĉ iliajn mienojn. Dank' al tio ni povas sufiĉe detale bildigi la

lastajn minutojn de la vivo de la granda urbo. Jen mastro forkuris, lasinte kortiston por ke li gardu la havaĵon. Jen avo, brakumante katon, ekdormetis surbenke apud la pordegoj de la propra domo kaj mortis surloke. Jen apud preĝejo petis almozon almozulo – bonkorulo donis al li monerojn kaj novajn ŝuojn, sed li ne sukcesis surmeti ilin...En la kazino por ĉiam restis du gladiatoroj: ili ne povis movi sin, ĉar ili estis alforĝitaj al muro, sed kial kune kun ili mortis bela junulino? Ĉi tie, verŝajne okazis iu romantika historio, kiun ni neniam scios. Sur la vojo, kiu kondukas for de la urbo, falis senforte kelke da forkurantoj. En iu domo oni forgesis ĉenitan

hundon, la kompatinda besto grimpis supren tra cindro kaj pumiko kiom permesis la longo de la ĉeno, sed tutegele mortis. Timindajn historiojn pri pompejanoj, kiuj por ĉiam rigidiĝis en la 79-a jaro oni povas priskribi tre kaj tre multe.

Tradicie sciencistoj suspektas, ke la morto

de ĉiuj loĝantoj de la urbo Pompejo estis longa kaj suferiga: ili inhalis cindron, kiu transformiĝis en iliaj pulmoj en cementon. Tamen antaŭ nelonge grupo da vulkanologoj el Napolo prezentis tiun teorion kiel dubinda. La vulkanologoj rimarkis, ke la mortintaj loĝantoj de Pompejo ne baraktis, ne agoniis, ne kaptis aeron per la buŝo – ilin unumomente mortigis forta ondo de arda vulkangaso, kiu aperis post la forĵeto de la ŝtona kapsulo el la ŝtopfermita kratero (kiam la premo de la vulkangaso en la magmo superis la firmecon de la minajoj).

Laŭ datumoj de sciencistoj, Vezuvio en la 79-a jaro forĵetis unu post la alia ses lafofluojn. La temperaturo de la lafofluo estis ĉ. 250-300 °C kaj la rapideco 104 km/h.

Sciencistoj trovis restaĵojn de pompejano, kiu mortis sidante en necesejo. Tiu fakto estas la plej konvinka pruvo de la teorio pri la morto de la pompejanoj unumomente pro forta ondo de arda vulkangaso - kiu en stato de asfiksio iros en necesejon?

En 1997 Pompejo enskribiĝis en la liston de la Monda Kulturheredaĵo de UNESKO en Eŭropo. ■



Gipsaj statuoj de mortintaj pompejanoj

Ekblogu Esperante nun!



ANA RIBEIRO - BRAZILU

Kial blogi? Eble kiam vi legis la titolon vi jam demandis vin. La unua kaj evidenta respondo estas:

*Por disvastigi ideojn! Sed blogado ne estas nur tio! Kiam oni blogas, oni certe plibonigas la skribadon, kaj ekhavas plurajn amikojn. Mi diras tion laŭ mia propra sperto, mi blogas de pli-malpli unu jaro. Kiam mi komencis, mi skribis tre malbone, miaj artikoloj havis ĉirkaŭ 80 vortojn kaj multe da bildoj; hodiaŭ mi ne skribas perfekte, sed mi skribas multoble plibone ol kiam mi komencis, kaj mi konas multajn homojn pro mia **blogo**!*

Eble vi jam volas blogi en via nacia lingvo, sed blogi Esperante estas mult-oble pli bona, vidu kial:

- * Kiam oni blogas Esperante, homoj tutmonde povas legi oniajn ideojn, kaj oni povos scii kion homo en Japanio, ekzemple, pensas pri io, kio okazas en Brazilo!
- * Ĉar la **blogosfero** en Esperanto estas malpli granda ol la blogosfero en multaj aliaj naciaj lingvoj, certe via blogo estos fama pli rapide ol ekzemple, se vi skribos angle.

- * Esperanta blogado certe montros al la mondo ke eblas ĉion esprimi per Esperanto!

Se iu, ekzemple, serĉante blogon pri sia preferata kantisto, rimarkas ke ekzistas blogversio en Esperanto, tiu eble pro sci-volo al-klakos tiun lig-ilon kaj ekinteresiĝos – almenaŭ tiu konstatos ke la internacia

lingvo vere ekzistas kaj ke oni per ĝi povas ĉion esprimi.

- * Praktiki la lingvon! - Blogi certe estas bonega sperto por iu, kiu volas praktiki Esperanton, vi povas ankaŭ pli-bon-igi vian lingvonivelon! Vi povas verki pri via ŝata temo kaj peti amikon aŭ instruiston prov-legi vian artikolon.

Certe ekzistas aliaj avantaĝoj, kiujn mi ne memoras nun! Eble, leginte la tekston vi vol-egas blogi, sed vi ne scias kiel! Mi diros kiel fari tion nun.

Kiel ekblogi Esperante

Antaŭ ol ekblogi vi devas respondi kelkajn demandojn:

Ĉu mi havos tempon por blogi?

Skribi certe ne estas tre facile kaj kelkfoje vi ne havas tempon por skribi ĉiun semajnon/tagon/monaton. Forgesi blogi unufoje ne estas grava problemo, sed estas pli bone entute ne ekverki ol ekverki kaj ne daŭrigi vian blogon!

Pri kio mi verkos?

Ekzistas multaj temoj por blogoj, kie ekzistas multaj temoj por blogoj, kiel muziko, kulturo, libroj, via vivo, Esperanto-movado, ktp. Elekti temon estas gravege ĉar, ekzemple, kiam iu vidas blogon pri kulturo el Brazilo, kiam oni revenas al ĝi, oni volas legi plu pri brazila kulturo. Sed, se tiam oni vidas afiŝojn pri rok-muziko en Britio, la blogo iĝos stranga al ni! Por elekti temon, mi donas al vi kelkajn konsilojn:

- * Vi devas verki pri io, kion vi ŝatas: Se vi ŝategas muzikon kaj malamas la naturon, vi ne devas verki pri bovoj!
- * Vi skribos por aliaj, do se vi volas ke oni vizitu vian blogon, ne skribu pri temo, pri kiu preskaŭ neniue interesiĝas, kiel ekz.: La ideala geologio por la bredado de bovoj en Paraibo, Brazilo.

- * Prefere vi devas bone koni tion, kion vi elektis: Se vi ja volas skribi pri bovoj en Nederlando, vi devas almenaŭ legi multe pri tio!

- * Se vi ne povas elekti **specifan** temon, verku pri via vivo. Se vi iras al iu koncerto, vi povas rakonti tion kaj paroli pri via preferata kantisto! Se vi vidis interesan filmon, vi povas ankaŭ rakonti tion kaj paroli pri la filmoj, kiujn vi preferas!

Kiel vi nomos vian blogon? En la Esperanta blogosfero ekzistas almenaŭ 2000 blogoj, oni havas multege da informoj hodiaŭ, do kial iu klakos sur la ligilo de via blogo? Ĝenerale, ĉar la nomo estas interesa! La nomo de blogo devas esti unika kaj prezenti ĝian temon: Ekzemple, ĉar mia blogo nomiĝas "Mia vivo kiel Ana", oni esperas legi blogon pri la vivo de Ana, ne pri bovoj en Norvegio!

Fine, vi devas elekti la blogo-sistemon, kiun vi uzos. La plej popularaj nun estas "Blogger" kaj "Wordpress".

Blogger: Se vi ne multe konas "HTML" kaj programadon por retejo, Blogger estas bonega. Ĝi estas treege simple uzbla, oni povas fari ne-profesiajn kaj belajn retpaĝojn rapide kaj facile! Se vi volas krei profesian retpaĝon, eble vi povas fari tion per Blogger, sed estos pli malfacila tasko.

Wordpress: Tiu blogosistemo estas iom pli komplika ol Blogger, sed oni povas fari multajn aferojn tie, ankaŭ tre belan blogon kaj profesiajn retpaĝojn! Se vi estas komencanto, Blogger estas pli bona, se ne, vi certe jam scias kiun elekti kaj kial!

Blogado certe estas bonega sperto por ĉiuj! ■

Blogo: Interreta taglibro

Blogosfero: La tuto el la interretaj taglibroj en Esperanto.

Specifa: Aparta, kiu al nenio alia similas.



Aligatorejo por aligatoroj

Ekde la 16a ĝis la 20a de novembro 2011 okazis en la estonia ĉefurbo Talino la 6a Foiro pri Edukaj Iloj. Ĝin organizis SALTO Youth Network kaj en ĝi reprezentis TEJO-n Manuela Ronco. Krome, ŝi organizis tie aligatorejon, kiu estis speciala – ĝi estis por veraj aligatoroj, neesperantistoj. TEJO-Tutmonde demandis ŝin pri la aranĝo kaj pri la reago de eŭropaj junuloj al la internacia lingvo.

TEJO-Tutmonde: Unue, pri kiu aranĝo temis?

Manuela Ronco: Pri la 6a Foiro pri Edukaj Iloj. En ĝi partoprenis 126 homoj, ĉefe el eŭropaj landoj, kiuj laboras diversmaniere por la junularo. Plejparte ili estis edukistoj aŭ projektmastrumantoj en junularaj organizoj aŭ oficistoj de eŭropaj instancoj, kiuj subtenas junularon, aŭ de la naciaj agentejoj de la programo "Junularo Aganta". La ĉi-jara foiro havis kiel ĉeftemon "Kulturo", sed miaopinie la programo ne multe substrekis tion. Ĉiukaze ĝi estis sufiĉe interesa kaj intensa: ĝi ĉefe konsistiĝis el mallongaj sesioj dum kiuj iuj el la partoprenantoj aŭ la organizantoj prezentis siajn "edukajn ilojn". Ĝi povis esti metodo por diskuti temon, ludo, art-teĥniko, manlibro ktp. kaj oni povis aŭ "prelegi" pri ĝi, aŭ igi la partoprenantoj rekte sperti ĝin. Temis pri ambaŭflanka lernado, ĉar la partoprenantoj estis invititaj komenti la ilon, sugesti ŝanĝojn por igi ĝin pli efika aŭ por uzi ĝin en alia kunteksto. Ĉiun sesion ĉeestis ankaŭ unu spertulo kiu havis la rolon de "kritika amiko", kun kiu la preleganto povis poste neformale diskuti. Memkompreneble ne mankis iuj pli distraj momentoj, kiel internacia vespero, koncertoj, vespera ekskurso al la urbocentro ktp, kiuj multe kontribuis bonetosigi la grupon.

TT: Ĉu la aranĝo plaĉis al vi?

MR: Ĝi estis unu el la plej bone organizitaj eventoj en kiuj mi iam ajn partoprenis. Jam en la halo de la flughaveno oni aranĝis budon por bonvenigi la alvenintojn kaj doni indikojn, kiel atingi la hotelon. Ĉio okazis ĝustatempe, la ejoj estis perfektaj, kaj estis multe da volontulaj helpantoj, kiuj havis ĉiu sian precizan kaj antaŭdifinitan taskon. La retejo estis ĉiutage ĝisdatigita kaj estis aparta skipo kiu okupiĝis pri la dokumentado de la evento, per fotoj, videoj kaj eĉ desegnoj. Ĉar ĉiam okazis samtempe kvin programoj, oni devis registriĝi antaŭe per la retejo, kie poste aperis onia "persona agendo", kun la tempo kaj loko de ĉiu programero. Krome, ankaŭ surloke oni trovis ĉiutage programtabulon, kun la listo de la aliĝintoj, por povi kontroli al kio oni registriĝis. Ankaŭ la prelegontoj devis antaŭanonci



TT: Fakte, kial vi decidiĝis partopreni en la foiron?

MR: Mi volis partopreni, ĉar TEJO planas plifortigon de la kultura fako kaj ĉar mi pensas, ke, ĉefe kadre de la ĵus naskiĝinta adoleska komisiono, gravas pripensi la edukan dimension de nia agado. Pli konkrete, mi esperis malkovri novajn ilojn, kiujn oni povu adapti kaj uzi por niaj celoj, kaj prezenti mem la sperton de

TEJO al la aliaj. Mi volis ankaŭ profiti okazon gravan el la ekster-rilata flanko.

TT: Kion do vi prezentis dum la foiro?

MR: Dum la foiro mi prezentis edukan ilon, do mi povis gvidi unu-horan sesion, kiun partoprenis 17 homoj. Mi decidis proponi cerboŝtormon pri lingvaj bariloj kaj lingva diskriminacio, petante du grupojn diskuti pri la du temoj kaj pretigi afiŝojn. Mi poste okazigis "aligatorejon", sed en kiu oni rajtis paroli nek sian denaskan lingvon nek la anglan. Mi pensis ke tio povus esti ekzerco por pripensi lingvajn barilojn dum internacia junulara agado, kaj ilo uzebla en internaciaj grupoj kiel interkona ludo kaj por prezenti la lingvan diversecon. Krom tio, mi montris kelkajn ekzemplerojn de Kontakto kaj de E-Elektronike, plus kelkajn aliajn informilojn kaj varbilojn.

TT: Kiujn reagojn vi ricevis?

MR: Rilate al mia programero, ĉe ĝia fino mi estis tre malkontenta. Fakte estis malmultege da tempo por enkonduki la temon kaj por diskuti, kaj mi pensas ke pro tio la plejmulto de la partoprenantoj ne kaptis la sencon de mia prezento. Ekzemple iu eĉ komentis: "Jes, la aligatorejo estis amuza ludo, sed ĝi ne helpas solvi lingvajn problemojn en internacia agado, kaj, kion mi pensis dum ĝi, estas, ke por interkompreniĝi estintus pli facile paroli angle". Tamen, mi ankaŭ rimarkis ke, kvankam ili preskaŭ ne ricevis ajnan startigon de mi, la du diskutgrupoj ekigis interesajn diskutojn pri la lingva problemo. La partoprenantoj estis ĝenerale homoj kun multaj spertoj tiurilate, ĉar ili multe vojaĝis kaj agis internacie. Kelkaj el ili starigis debaton ankaŭ el politika kaj ekonomia vidpunkto, kaj kvazaŭ ne volis halti... Do, verŝajne ne estis kompleta fiasko.

TT: Mi bedaŭras, ke la rezulto de via prezentado ne estis tio, kio ĝojigus nin...

MR: Post mia sesio mi havis babiladon kun la "kritika amiko", brita spertulo pri edukado. Liaj komentoj estis sufiĉe pozitivaj. Li ĉefe donis al mi kelkajn konsilojn, kiel kondukti dum publika parolo. Mi evidente ne elstaras pri tio, sed pli kaj pli pliboniĝas. Ekzemple li diris ke mi povintus pli efike "merkataĉi" mian ilon, ne zorgante pri tio, ke ne estas tempo por bone klarigi, aŭ ke mi antaŭe neniam uzis ĝin ekster Esperantujo, ktp. Sed simple ŝajnigante ke mi estas montranta ion mojosan al la aliaj, kaj donante al ili nemaltrafindan okazon por lerni pri ĝi, k.s. Li ankaŭ substrekis ke en unu-hora sesio estas tre malfacile prezenti ion, ĉar oni ne havas eblon adaptiĝi al la publiko, ŝanĝi programon, k.s., sed, ke tio, kion mi traktis, estis interesa temo por trakti dum seminario aŭ dum junulara interŝanĝo, kaj li instigis min prilabori ĝin por estontaj uzoj.

TT: Ni parolis pri via prezentado kaj pri la reagoj pri ĝi. Sed kiaj estis la reagoj ĝenerale al Esperanto – ne depende de via prezentado?

MR: Mi preskaŭ ne parolis pri Esperanto, sed diversaj homoj si iniciate venis serĉi min por peti informojn. Multaj diris ke ili



Fotoj: Tatjana Petrukha

ĉiam simpatias al la ideo de la lingvo internacia, sed ne multon konis. Kelkaj ŝajne ekhavis malbonan impreson de io, kaj timis trovi tre fermitan aŭ fanatikan medion. Sed aliaj nomis al mi konatulojn esperantistojn, kun kiuj ili jam plezure kunlaboris, aŭ ĉiukaze diris ke ili volonte kunlaboros kun E-organizaĵoj. Alia interesaĵo estas la "sukceso" de la revuo Kontakto, kiu multe plaĉis al ĉiuj... Iuj demandis ĉu mi ne havas version en la angla por donaci al ili, kaj aliaj petis ekzempleron, kvankam ili ne povis kompreni la artikolojn. Ŝajne ili estis altiritaj de la temoj, aktualaj kaj internaciaj, ekzemple knabo el Cisjordanio rekonis el la bildoj artikolon pri bierejo en sia lando, kaj multe miris pri tio. Mi donis al li ekzempleron: eble li eklernos la lingvon nur por kompreni kion oni diras pri lia lando!

TT: Ĉu la foiro okazos denove?

Jes, venontjare ĝi okazos en Varsovio. Mia opinio estos ege grave denove partopreni, ĉi-foje pli preparitaj kaj pli multnombraj.

Do mi esperas, ke pola E-junularo notos tion en sia agendo.

TT: Do, ni kaptu la ŝancon! Manuela, dankon por la intervjuo!

MR: Dankon al vi.



Februara renkontiĝo en Kubo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ - KUBO

Ekde la 15a ĝis la 19a de februaro 2012 okazos en Kampadejo Río Seibabo Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERO 2012). La ĉeftemo de la aranĝo estas „Esperanto: internacia lingvo por edukado al daŭrigebla evoluo“, sed oni pritraktos ankaŭ ekzemple lingvan ekologion, kulturen kaj lingvan diversecon aŭ kulturen identecon. La vorto „seibabo“ el la lingvo de niaj tainaj praloĝantoj signifas lokon kun multe da ceiboj. La kampadejo Río Seibabo, sudokcidente de Manicaragua, sur la limo inter la provincoj Villa Clara kaj Sancti Spiritus estas ideala por Kuba Esperanto-Renkontiĝo 2012.

Tre rava naturo ĉirkaŭas la turismejon, kiu disponigas al ni sportejojn (volejbalo kaj basketbalo), komputilejon kaj videohalon. En du-tri aliaj ejoj eblos okazigi diversajn kunsidojn. Surloke aĉeteblas trinkaĵoj kaj leĝeraj manĝaĵoj.

Ne nur kunsidoj formalaj kaj neformalaj, sed ankaŭ lernado, distriĝo kaj amuziĝo estos konsistiga parto de nia restado. Tie eblos ankaŭ bani sin en la puraj akvoj de la rivero Seibabo, al kies bonaj banlokoj kondukas du piedvojoj.

Se vi volas partopreni, kontaktu:

Ismayr Lezcano García

Asociación Cubana de Esperanto

Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero,

La Víbora

10 de Octubre, 10500 La Habana

ismayr@esperanto.co.cu

Kvardek aktivuloj renkontiĝis en Dresdeno

En mojosa etoso pasis Aktivula Renkontiĝo, kiu okazis en la germana urbo Dresdeno ekde la 28a ĝis la 30a de oktobro 2011. Organizis ĝin Germana Esperanto-Junularo kaj partoprenis ĝin kvardek aktivaj gejunuloj ĉefe el Germanio, Ĉeĥio kaj Pollando, sed venis unuopuloj ankaŭ el Britio kaj Hungario.

DANIEL MRÁZEK – Ĉeĥio

La organizantoj elektis bonegan lokon: junularan ŝipon sur la rivero proksime de la urbocentro. La programo komenciĝis vendrede la 28an de oktobro per vespermanĝo kaj enkondukaj informoj, kio la partoprenantojn atendas. La ĉefa tago poste estis sabato. Antaŭtagmeze prelegis Lu Wunsch-Rolshoven, kiu la

ĉeestantojn konatigis kun tio, kiel efike organizi renkontiĝon. Li emfazis, ke certe gravas, por kiu celgrupo la aranĝo devas esti – kaj laŭ tio elekti la lokon, daton kaj longecon de la renkontiĝo. Li ankaŭ malkaŝis, kion ne forgesi pritrakti kun la posedanto de



Junulara ŝipo

la ejo, kie la renkontiĝo okazis. Laŭ li utilis ankaŭ, se organizantoj havas taskoliston, por ke ĉiu sciu, kion fari kaj kiam.

La posttagmanĝa programero apartenis al Rolf Fantom. Li organizis laborgrupon, en kiu li emfazis, ke necesas, ke la aranĝoj estu taŭgaj ankaŭ por novuloj en la Esperanto-movado. Se oni plenigas aliĝilon por iu aranĝo, estas por spertulo facile decidi ĉu elekti amasloĝejon aŭ ĉambrojn, aŭ kiun landkategorion indiki. Sed novulo ne scias, kio estas amasloĝejo aŭ landkategorio. La laborgrupo de Rolf komenciĝis fakte jam vendrede vespere, kiam

li al la partoprenantoj disdonis aliĝilon al iu fiktiva aranĝo kaj taskis al ili plenigi ĝin. Problemo estis, ke la aliĝilo estis plenplena de kolumnoj kaj skribita per la araba skribo... Tiel Rolf volis demonstri, kiel povas senti sin novulo plenigante aliĝilon al iu E-aranĝo. Dum sia sabata programero li poste proponis alian, pli taŭgan, aliĝilon. La organizantoj de iu aranĝo do devus pensi ankaŭ pri nespartuloj kaj proponi al novuloj iun interesan programon, por ke ili ne sentu sin fremdaj.

Dimanĉe antaŭtagmeze prelegis Julia Hell pri fortaj kaj malfortaj lokoj en Esperanto-asocio – kaj kiel solvi ilin.

Memkompreneble oni ne nur laboris. Leo Sakaguchi preparis malgrandan diskotekon (dum kiu oni devis ege atenti, ĉar en la ŝipo estis tre malaltaj plafonoj:-)) kaj ĉiuvespere oni grupe promenis en la historia urbocentro kaj serĉis drinkejon (trovi taŭgan drinkejon por kvardek personoj ne tiom facilas :-). Oni povis ankaŭ ludi kartojn aŭ tabulludojn. Do, post la tago plena de laboro oni povis bone ripozi, amuziĝi kaj precipe amikiĝi.

Post la dimanĉa tagmanĝo en kebabujo venis adiaŭo kaj la partoprenintoj disvojaĝis al sia hejmo kun akiritaj spertoj, kiuj espereble estos uzataj por kresko de Esperanto.



Prelego de Rolf Fantom



Prezentado

Fotoj: André Müller

Lingvokurso en Varsovio

SZABOLCS SZILVA – HUNGARIO

La 6an de oktobro 2011 en Varsovio, Pollando, mi komencis instrui mian unuan grupon de "esperantistoj". Evidente laŭ la vortoŝerco, temas pri ontaj esperantistoj, kies lingva nivelo tiam estis nulo. Antaŭ ol mi instruis tiun ĉi grupon, mi jam instruis private en Hungario dum du jaroj, sed ĉiam nur unu personon en la sama tempo. Ni povas diri, ke ankaŭ mi estis "nululo" pri la instruado dum la kurso.



Fotoj: Szabolcs Szilva

Aldoniĝas, ke ni ja ne havis komunan lingvon tiam: mi ne parolas ilian gepatran lingvon, la polan.

Kiel mi poste eksciis, en ĉiu aŭtuno en ĉiu jaro okazas E-kursoj en Varsovio. Tion mi trovas tre bona afero, ĉar tiel ĉiam estas eble kapti novajn personojn. La ideon pri tio, ke mi okazigu kurson, levis Arkadiusz Zychewicz, la

prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Mi sentis min honorigita kaj dankeme akceptis la inviton. Anna Magier, estrarano de PEA, proponis sin kiel helpanton. Mi akceptis, kaj nun ŝi en preskaŭ ĉiuj lecionoj havas sian eron por taski al lernantoj.

La leciono okazas en la sidejo de PEA ĉiu-ĵaŭde vespere. La kurson partoprenas konstante ĉirkaŭ ses personoj. Mi nomas ilin "la forta kerno". Dum la leciono mi uzas preskaŭ nur rektan metodon, kaj nur Esperanton por instrui. Ankaŭ por mi estas bonege vidi la efikon de tiu metodo, pri kiu mi jam lernis antaŭe de spertaj instruistoj. Ili estas tre diligenta grupo, jam post la naŭa leciono ili kapablas esprimi sin pri la familio, laboro, tagordo, veturado, tempo kaj vetero. Kaj kion ili scias en la fino de la kurso? Kiu scias? Eble ili devus pripensi fari ekzamenon pri Esperanto.



TEJO serĉas... novan redaktoron de TEJO-Tutmonde!

Ĉu vi ŝatas ĵurnalismon? Ĉu vi interesiĝas pri la internacia junulara E-movado? Fariĝu redaktoro de TEJO-Tutmonde, kaj helpu ĉiam liveri aktualajn, interesajn informojn pri tio kio okazas en TEJO kaj en ĝiaj Landaj Sekcioj.

Pliajn informojn ĉe: www.tejo.org



Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas la kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas la kadro de niaj klopodoj.

TTT-tejo: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176 - NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (010) 436 1 751,
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Łukasz ŻEBROWSKI – prezidanto, kunordigo, homaj rimedoj - lukasz@tejo.org
Paulína KOŽUCHOVÁ – ĝenerala sekretario, kulturo - paulina@tejo.org
Alisa NIKITINA – kasisto, financoj, subvencipetado - alisa@tejo.org
Sergey TYIRIN – unua vicprezidanto, informado - sergeo@tejo.org
Michael Boris MANDIROLA – dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj - michael-boris@tejo.org
Nico HUURMAN – tria vicprezidanto, aktiva trejnado, seminarioj - nico@tejo.org
Tina TIŠLJAR – estrarano, kongresoj - tina@tejo.org
Petra SMIDÉLIUSZ – estrarano, landa agado, edukado - petra@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun la rubriko TEJO-Tutmonde
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon engaĝiĝi en interesa kaj internacia agado kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktiva Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku la celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado") Eblas ankaŭ tiel donaci por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

NE MANKAS KIALOJ POR MEMBRIĜI EN

tejo

EN 2012

REVUO KONTAKTO!



KONTAKTO ESTAS DUMONATA SOCIKULTURA
REVUO POR TEJO-MEMBROJ



IJK!

VI POVAS PLI FAVORPREZE ALIĜI
AL LA INTERNACIAJ JUNULARAJ KONGRESOJ DE TEJO

NOVAJ T-ĈEMIZOJ!



MOJOSAJ T-ĈEMIZOJ, KIUJN
UNUAFOJAJ MEMBROJ RICEVOS SENPAGE*

PASPORTA SERVO!

VI TUTMONDE GASTOS KAJ GASTIGOS PER LA
GASTIGA RETO DE TEJO



JUNA E-KOMUNUMO

VI HELPOS JUNULARAN ORGANIZON KAJ HAVOS SANCON
ENGAGIĜI EN INTERNACIAJ PROJEKTOJ

